



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 6-a de Majo 2019

**Ĉeestantoj:** Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Gabi Zeevi.

*Protokoloj de du pasintaj kunsidoj – Dror publikigos en la retejo!*

[http://esperanto.org.il/dosi\\_eroj/ELI EP201903.pdf](http://esperanto.org.il/dosi_eroj/ELI EP201903.pdf) - kaj

[http://esperanto.org.il/dosi\\_eroj/ELI EP201904.pdf](http://esperanto.org.il/dosi_eroj/ELI EP201904.pdf)

### 1. **Sciigoj**

Amri verkis raportojn pri la IK kaj la postkongreso, la artikoloj aperis/os en Esperanto, UEA.facila, La Ondo de E-o kaj IE.

### 2. **Dratverejo** (Jehoŝua, Amri, Ŝlomo)

a) La luanto daŭre evitas pagi la lupagon. Li ŝuldas jam pli ol dek mil NIS.

b) Jehoŝua ne sukcesis paroli kun li, malgraŭ la oftaj provoj. Ili klare evitas la kontaktprovojn!

[*Ĝisdatigo: Jehoshua sukcesis paroli kun la luanto telefone. Evidentiĝas ke li pagis en aprilo 4000 NIS al Amos*]

c) La decidoj en la pasinta kunsido pri leĝaj paŝoj kontraŭ la luanto ne estis plenumitaj!

ĉ) La filino de la antaŭaj luantoj kontaktis la elektrokompanion, sed ne sukcesis ŝanĝi la registritan nomon, nek malkonektigi la elektron.

d) Ŝlomo vortumis avertleteron kun adv. Modan, kaj donis al Amos, por ke li transdonu ĝin al la luanto. Verŝajne Amos ne faris tion, ĉar li estis eksterlande.

e) Amri parolis plurfoje kun adv. Modan, kiu admonis ne pli perdi tempon kaj tuj sendi la leteron, kaj unu semajnon poste eki procedon de ekzekuto (הוצאה לפועל).

f) Amri interkonsentis kun adv. Modan, ke li sendu la leteron al la luanto (Ŝlomo resendis al Modan dimanĉe), kaj Modan petos ekzekuton.

[*Ĝisdatigo: Modan diris ke tamen devas mane transdoni la leteron, kaj se li ne malfermos la pordon, surglui. Meze de majo Amos surgluis la leteron sur la pordon de la luanto*]

g) En la lu-procedo okazis pluraj severaj eraroj:

1) Oni ne prenis iajn datumojn de la garantianto, eĉ ne telefonon aŭ laborlokon, sekve la garantio senvaloras.

2) Oni ne postulis transmetadon de la elektra kaj akva kontoj.

3) Kiam evidentiĝis ke la luanto estas kanajlo, kaj li ne pagas, oni lasis plurajn monatojn pasi sen ajna ago.

4) Oni ne adekvate reklamis la apartamenton, sekve ĝi staris malplena dum duonjaro.

ĝ) Tiel rezultis giganta perdo por ELI: ĝis nun ĉ. 30,000 NIS, estonte eĉ pli, ĉar la procedo de la forigo de nepaganta luanto povas daŭri multajn monatojn.



h) Pro la ĉeso de la enspezoj de lupago, ELI maltrafis la ŝancon aĉeti oficejon en WE, ĉar ni ne povis devontiĝi al repago de la prunto kiun la vendisto konsentis fari, sekve li jam vendis la oficejojn ĉe la salono al aliaj.

ĥ) Propono: estonte Ŝlomo kontrolu la luadon kaj la kontrakton, kune kun la advokato.

h) Ŝlomo pretas ankaŭ montri la apartamenton al eventualaj luantoj, se li povos laŭnecese tranokti tie. Decido: unuanime akceptita!

### 3. Oficejo (Amri)

a) Aviĥai de WE telefonis, volis vendi al ni oficejon sen prelegejo. Amri malakceptis. Eble li fabrikos novan proponon.

b) Recital proponas vendi al ni uzo-raĵton por la tuta spaco de la ŝirmejo (salono de 25 m<sup>2</sup> nete) en alia etaĵo. Prezo: 450 mil, ili pretas prunti 100 mil. Adv. Modan kaj Amri kontrolis, ŝajne tiu propono ankoraŭ ne estas matura. Temas pri uzo-raĵtoj kaj leĝoj por *publika* spaco!

### 4. Financoj (Ŝlomo)

a) Amri pretigis la bilancon de la IK kaj la PK-oj. Estiĝis malgranda deficito (ĉ. 1400 NIS, el buĝeto de pli ol 55,000 NIS). Se ne okazus la devaluiĝo de la eŭro kontraŭ la NIS, ĝi estus eĉ profita!

b) Raporto de Ŝlomo pri unua kvarono de 2019. Notu la deficiton: 11,500 NIS! Ĉefaj kaŭzoj: 9000 NIS manko de lupago, 7000 NIS ne antaŭvidita kosto de la kurso.

c) La kontisto sendis la raporton por 2018. Kosto 2925: NIS.

ĉ) Propono: estonte la pago al la kursinstruisto estu surbaze de la enspezoj de la kurskotizoj, ne multe pli ol la enspezoj. Tion ni devas indiki por la venontaj kursgvidantoj. Samtempe ni povas plialtigi la kursprezon. Unu propono: 400 NIS x 2 por la 4 monatoj. (*Pripensinda!*)

d) Por la kontista raporto Ŝlomo petis de Jehoŝua la nombron de membroj ĉi- kaj pasintjare, sed daŭre ne ricevis tiujn datumojn. Jehoŝua: 2016: 62 pagintoj, 2017: 68 pagintoj.

e) Ŝlomo pretas enkasigi la membrokotizojn, sed bezonas la membrolistojn de Jehoŝua. Jehoŝua: mi sendos ĝis la venonta kunsido, al Ŝlomo kaj al ni ĉiuj!

### 5. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

a) Amri verkis grafikan proponon por la kovertoj, kaj presigis 1000 en Yakir Print.

b) Amri presigis la 28-paĝan n-ron 167 pretigitan de Mikaelo, 200 ekzemplerojn.

c) La kovertoj kaj la ekzempleroj de IE estis senditaj de la presejo al Mikaelo.

ĉ) IE-167 estis disdonita dum IK, ankaŭ al la eksterlandaj gastoj.

b) Mikaelo dissendos IE-166 kaj 167 kune.

d) Mankas ĉ. 30 ekz. de ĉiu el ili, de 166 Amri havas stoketon kaj alportis, de 167 mankas pro la disdonado al gastoj, ĉu ni sendu nur malpli au presu pli? Evidentiĝis ke Mikaelo enkovertigis al kelkaj kiuj eble jam ricevis. Do, Amri retrovos/rekonstruos liston pri tiuj kiuj jam persone ricevis dum la kunvenoj [*jam farita*].

e) IE167 ankoraŭ ne estis enretigita – Dror, bv. fari!

3/...



## 6. IK-20, 21 (Amri)

- a) En Eilat partoprenis 52 samideanoj, rekorde multaj (23) eksterlandanoj, kaj relative malmultaj israelanoj.
- b) La PK-ojn 1-2-3 (Petra, Israelo, Nordo) partoprenis 20, 14, 9 responde.
- c) Amri raportis pri la IK en Esperantujo kaj al la membroj.
- ĉ) Dror bv. aldoni la raporton al la IK-raportoj <http://esperanto.org.il/ik.html>, ankaŭ mankas tie artikoloj pri la IK-j en la jaroj 2012-2108 (eblas preni ilin el antaŭaj n-roj de IE)!
- d) Dror preparis belan IK-retejon <http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>, inkluzive detalan programon.
- e) Proponoj por 2020: TA (Bnei Dan), Jerusalemo (Agron), aŭ Petaĥ Tikva (en tiea junulara gastejo). Pripensindaj!

## 7. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua jam antaŭ tri monatoj devontiĝis telefoni al Martin Shaeffer, ĜD de UEA por pledi por pli malalta kotizo.
- b) Por finfine trakti tion, Amri retmesaĝis al Martin Shaeffer kaj al Mark Fettes, Prez. de UEA. Mark tuj respondis akcepte al la du proponoj:
- 1) Por la transira jaro meti Israelon en la 4-a anstataŭ la 5-a kategorio (baza membreco kostos 27 eŭrojn anstataŭ 44, ŝparo de 60%!).
  - 2) “Kanutigo” de ĝis 10 israelaj s-anoj laŭ rekomendo de ELI.
- c) La kondiĉo – ke ELI kaj la ĈD energie agu por remembrigi eksmembrojn. Ni eklaboru! [*Ĝisdatigo: Martin precizigis, ke ĉiu membro de ELI kiu tion petos kaj ELI rekomendos, povos membriĝi kiel IM de UEA en la 4-a kategorio (27 anstataŭ 44 eŭroj)*]
- ĉ) En la februara kunsido estis decidite, ke Jehoŝua telefonos (ĝis la marta kunsido) al Martin Shaeffer por pledi por pli malaltaj kotizoj.
- d) En la marta kunsido estis decidite: “Ĝis la fino de marto Jehoŝua verkos la protestan leteron al la Komitato kun la rezulto por la israela IM-aro”
- e) Jehoŝua devus telefoni al antaŭaj IM-oj por informiĝi, kiuj pretas remembrigi. Ĝis nun: El ĉ. 65 IM-oj (plej multe en la kategorio MG, 8 DM-oj): Eli BY, Luiza, Oded K, Gabi, Ariel Ŝvarc (TEJO), Tuvja Rosenberg, Ĥaja MJL, Miklaf, Cvi, David MA - donace 6+4. Antaŭe 30 delegitoj, nun 8.

## 8. LK Tel-Avivo - kiam?

Agordigi daton kun Efrati! Eblas 11/6, preferinde 18/6, mardoj. Ĝi estos plia elspezo! [*Ĝisdatigo: Amri proponis, pro la malbona financa situacio de ELI kaj la malalta nombro de ĉeestantoj en la lastaj LK-j, rezigni pri la salono kaj okazigi la LK-on en la klubejo. Michal kaj Eldad subtenis.*]

**La venonta kunsido:** 3-a de Junio 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi